

Familia

ESPERANTO

cirkulaĵo n-ro 50 – septembro 2011a

Redaktanto ne vindas

Abundas renove la mesaĝoj en retdiskutlistoj, ĝenerale. Ŝajnas ke multaj homoj rericivis energion.

Mi esperas, ke ankaŭ vi.

En la sino de la komisiono de Rondo Familia ni havis diskuton pri la maniero de dissendado de la 'Cirkulaĵo de Esperantaj familioj'. (Mi preferas onte paroli pri 'Familia Esperanto', simple.)

La antaŭaj numeroj, sub redaktado de Claude Rouget, ankoraŭ estis paperaj kaj evidente oni devis aboni ilin, prezo: € 10, = jare. Nun en la reta epoko homoj ŝajnas pensi ke ĝi devas esti senpaga. Tiu opinio ne estas mia. Por redakti bultenon bezonatas sufiĉe multe da tempo kaj legovolontoj devas konscii pri tio. Nur se la kvalito ne taŭgas, oni ne rekomencu la redaktan laboron.

Alia afero estas, ĉu la redaktanto estas pagata el tiu kotizomono. Ĉar mi estas emeritulo kaj dediĉas min al Esperanto, mi ne volas monon. Sed sana ekonomika principo estas, ke laboro aŭ varo devas kosti.

Bedaŭrinde oni ne ĉiam obeas tiun principon. Se oni farus tion, ankaŭ ekzemple UEA estus pli sana. Oni sciis facile ĉu iu ĝia ekstra servo alportas la gajnon en formo de pli da membroj, donacoj ktp. Se ne, oni povus decidi ke la servo malaperu.

Due: socivaste oni povas konstati ke, almenaŭ en la industriizita mondo, junuloj al kutimiĝis al tro da 'vindiĝado'. Do ne atendu de mi, maljunulo, ke mi vindas vin !

Trie: ankoraŭ ekzistas io kia 'regulareco'. La regularo de Rondo Familia legiĝas en artikoloj du kaj tri:

2. La Komisiono de Rondo Familia celas unuavice subteni la uzon de Esperanto en la ĉiutaga vivo kiel familia lingvo. Ĝi krome celas subteni la poresperantan agadon de homoj en la meza generacio.

3. Por atingi tiujn celojn, la Komisiono:

- a. tenas rilatojn kun reto de esperantistoj, kiuj mem uzas Esperanton kiel familian lingvon kaj deziras interkontaktiĝi kaj kunlabori;
- b. organizas Familiajn Renkontiĝojn en diversaj mondopartoj;
- c. eldonas informilojn kaj materialojn por la membroj de la reto;
- d. *kolektas kaj administras financajn rimedojn por tiuj celoj.*

Ĉu [Bert Schumann](#), [Adelaïde Charrière](#) kaj mi, membroj de la Komisiono, bone plenumas tiujn taskojn? Mi dubas.

[Johan Derks](#)

Enhavo

Redaktanto ne vindas	1
Klopodoj por verdigi togolandan familion	2
'Deda Mraz'	3
Analizo de Internacia Junulara Kongreso en Kievo	4
Intervjuoj pri amrilatoj kaj esperantisteco	6
Esperanto: ĉu Fundamenta, postFundamenta aŭ preterFundamenta?	8
Anonco	8
Rakonto	8
Tradicia Renkontiĝo de Esperantaj Familioj en Lesjöfors	9
Venontaj aranĝoj	10
Unua Internacia Esperanto semajno	10

KLOPODOJ POR VERDIGI TOGOLANDAN FAMILION

Afero de interkonsento.

Ne en ĉiuj E-familioj ambaŭ gepatroj estas esperantistoj. En kelkaj nur la edzino parolas la lingvon, dum en aliaj nur la edzo estas Esperantolingvano kaj inverse. En tiu kazo por la plurlingva edukado de infanoj, oni aplikas ĝenerale la regulon « **Unu persono, Unu lingvo** », se tiel decidis la geedzoj. Tiam ĉiu el la geedzoj parolu nur sian lingvon al la infanetoj. Tiuj ĉi lastaj memoras/kaptas ambaŭ lingvojn kaj nepre tion aplikos/praktikos pli malpli poste. Tion-ĉi mi ne spertis.

Rilate mian kazon, mi pli frue decidis havi iam verdan familion antaŭ ol mi edziĝis. Ĉe la komenco mi mem estis esperantisto kaj mia amantino (nuna edzino) ne-esperantisto. Dum ŝi ame rilatis kun mi, volonte ŝi interesiĝis pri Esperanto. Mi tuj ekinstruis ĝin al ŝi. De kie venis al mi la ideo ? Mi trovis plezuron praktiki Esperanton ekde la jaro 1988, kiam mi eklernis ĝin. Mi legis pri du- kaj trilingva edukado artikolojn de E-familianoj en revuoj (Esperanto de UEA, Familia Esperanto). Tra ili mi malkovris spertojn, konsilojn de e-istoj, resume kion fari, kiel kaj kiam por sukcesi. Krome, en nia medio oni praktikas sukcese dulingvan edukadon uzante enlandajn lingvojn. Ĉio-ĉi tre interesis min kaj mi esperis atingi ankaŭ mi tion. Pli poste mi (estinte fraŭlo) ekagis por realigi mian ideon, t.e. la stariĝon de E-familio. Nu, mia amantino esperantistiĝis (komencantino). Mi kuraĝis iam konigi al ŝi mian engaĝiĝon havi nepre verdan familion (unu el miaj kondiĉoj por geedziĝo). Ŝi akceptis favore. Ŝi loĝis en vilaĝo malproksime de la mia. Dum niaj renkontiĝoj, ni uzadis E-on. Du monatojn antaŭ la naskiĝo de nia unua filino ni kunvivis. Tio estis okazo por ni plupraktiki la lingvon parole. Notindas, ke mia edzino kaj mi estas samlingvanoj. Ankaŭ la francan ni parolas.

Propraj spertoj

Ni paroladis al nia filino « **Adjoa Alix** » [Aĝoa Aliks] nur Esperanton denaske. Ŝi bone reagis rilate niajn dirojn (petojn, rekomendojn, riproĉojn...). Ekzemple: Alportu teleron, Ne faru ! Atentu ! Manĝu; Sidu; mamsuĉu; Prenu;



Venu; Iru al panjo. Ŝi foje respondis per gestoj, ridoj, ploroj. Ŝi enkapigis/komprenis preskaŭ ĉion, kion ni diris. Sed kiel infaneto kaj same kiel en ĉiu lingvo, la dezirata rezulto estas ne tuja sed certa. Mi verkis Esperantajn beb0-kaj lulkantojn por ŝi. Je sia dujariĝo ŝi ekparolis klare en Esperanto. Estis ĝojiga surprizo por mi, mia familio, geamikoj kaj geesperantistoj. Ili esprimas tion diversmaniere tra siaj kuraĝigaj kaj gratulvortoj. Ili miras, ke etulino tiel parolas fremdan lingvon kiel ties gepatroj. Mia edzino ege kontribuis por atingi tian rezulton. Pro tio ŝi perdis vortojn franclingvajn kaj la fluecon de la lingvo mem antaŭ sia esperantistiĝo. Kiel afrika patrino ŝi prizorgas grandan parton de la

Bildo 1: Tri infanoj po tri lingvoj

edukado de infanoj. Longan tempon pasigas la infanoj ĉe ŝi. Do kiam en iu homparo (almenaŭ en Afriko) la edzino estas implikata en la lingva edukado, ĉio plifacilas kaj donas bonan rezulton, ĉar patrino lingvo estas signifa ĉe infaneto. Mi konstatas, ke akiro de pluraj lingvoj kaŭzas ke il influas unu la aliajn ĉe infaneto; ĝi komencas frazon en iu lingvo sed ĝin finas en alia. Ekzemple: *Mi trinkas esi* (= Mi trinkas **akvon**).

Obstakloj

Parencoj kaj geamikoj, nesciante kaj Esperanton kaj pri la neceso eduki plurlingve (ekzemple: naclingve kaj Esperante) malkonsilas, mokus, malkuraĝigas ĉefe virinojn praktiki tion. Ili taksas la lingvon stranga, fremda, malbona, diabla, ktp. Iuj eĉ asertis, ke nia filino ne scipovos nian lokan lingvon (Minon). Laŭ tiu-ĉi logiko, Adjoa ne

bone parolus Minon kiel ŝi devus normale. Tio estos pruvo, ke mia edzino fidu je la kontraŭantoj de E-lingva edukado. Verdire ni ne ĝin parolis al ŝi pro la fakto, ke la medio helpas ŝin akiri nepre la lokan lingvon. Mi certigis al Ewoe (mia edzino), ke ni havos kontentigan rezulton, se ni persistos praktikante nian edukmanieron. Tamen ĉu ŝi tion respektis centprocente dum mi forestis la domon?

La sukceso dependas de la engaĝiĝo de ambaŭ geedzoj, se male la espero estas for.

Ni havas du aliajn gefilojn: **Ami Benata** kaj **Yao [Jao] Elom**, respektive 13 kaj 12-jaraĝa ĉi-jare. Benata pli profitis el la E-scipovo de Alix ol ŝia frato por evolui. Ĉiuj tri parolas Esperanton, la minan ([superreganta loka lingvo](#)) kaj la francan (lernitan en lernejo). Inter si kaj kun la patrino ili oftege uzas Minon. Ĉiam kun la tri gefiloj mi komunikas en Esperanto.

La sekreto por la fina rezulto.

Mi pensas, ke la denaske lingva edukado de infanoj rilatas al neniu mistero krom la natura oferto. En niaj respektivaj landoj kaj medioj homoj praktikas sukcese, senprobleme kaj sen granda atento plurlingvan edukadon uzante ne devige fremdajn lingvojn. Esperanto ne esceptas. Nur alparoli la infaneton en la elektita eduklingvo estas necese, tio eblas en ĉia vivanta lingvo. Necesas ankaŭ pacienco, persistemo, kuraĝo kaj saĝeco por ne ribeligi aŭ nervozigi la infaneton, ĉar ne ĉion ĝi alproprigas facile. Oni estu tolerema al ĝi, al ĝiaj diroj. La kompreno tiam sufiĉas, ĉar vorto ĉe infaneto, egalas frazon. Ĉu ni ne sciis, ke infaneto, kies patr(in)o estas foriranta, povas diri simple "paĉjo/panjo" por esprimi multon? Povas esti ekzemple *paĉjo/panjo ne forlasu min; venu; mi iru kun vi*;... Por korekti erareto(j)n, oni intervenu foje preskaŭ diskrete tiel, ke la infaneto ne sentu tion impona. *Mi trinkas akvon* aŭdigu trankvile la edukant(in)o tuj post la infana frazo: *Mi trinkas esi*, ne postulante, ke ĝi ripetu la bonan.

[Kokou SAGBADJELOU](#), kasisto de Tietti-instituto en Togolando

'Deda Mraz'


En la retlisto denask@googlegroups.com mi metis la demandon: "Kion signifas 'Deda Mraz' (aŭ 'Ded Moroz')?"

Mi nun povas klarigi: 'Avo Mallumo' aŭ 'Avo Frosto', la personigo de la reveno de la suno en sia ĉiujara ciklo, festata pagane kiel Julu (daŭris 12 tagojn ĉe ĝermanaj popoloj) kaj kristanigita kiel Kristnasko (25a de dec.). Estis unu kiu respondis ĝuste: Bert Schumann.

Ekzistas pluraj tiaj sezonaj festoj kiuj estis kristanigitaj: Somermeza festo (21a de junio, fariĝis festo de Johano la Baptisto), Samhain [Saun] aŭ Halovino (fariĝis 'Ĉiuj Sanktuloj', 1a de nov.), kaj aliaj keltaj festoj kiuj ne estis kristanigitaj kaj ankoraŭ vivas en folkloro aŭ reviviĝis en Viko, novpaganismo.

'Avo Frosto' estis propagata de komunismo kiel malkristanigo de Kristnasko.

Kompreneble la reveno de la suno (solstico=sunhalto, revene aŭ retroire) estas festata en ĉiuj teritorioj de la mondo kun alta latitudo, ĉar tie la malsamecoj inter la vintra kaj somera sezonoj estas plej fortaj. La anglalingva kaj hispanlingva Vikipedioj donas longan liston de priskriboj de tiuj festoj, ankaŭ ekster Eŭropo.



Bildo 2: Diagramo de la fazoj de Tero, el nordhemisfera perspektivo. Ekstreme dekstre: solstico de (proks.) 21a de dec.

Mi havas demandon al vi por la sekvanta numero de Familia Esperanto:

En kiu sezono aŭ dato Tero estas plej proksima al Suno?


La findato por ricevi kontribuojn por la numero de januaro 2012a estas 10-1-2012 !

[Johan Derks](#)

Analizo de Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Kievo

Ĉerpaĵoj el la artikolo de Carolin Weemeyer en 'Libera Folio'

Mi partoprenis ĉiujn IJK-ojn de 2005 ĝis 2011 krom la pasintjaran en Kubo. Krome mi de 2004 ĝis 2009 estis ano de la GEJ-komisiono por renkontiĝoj, kiu preparis la Internacian Seminarion (IS). Miajn tieajn spertojn mi resumis per la jena grafikaĵo de "IJK-konstruaĵo".



La ĉefan, unuan bazon formas la LKK. Nur poste sekvas la partoprenantoj. Diversaj kolonoj tenas la tegmenton, la bonan etoson, kiu laŭ mi formas la celon de la renkontiĝo. Gravas aldoni, ke ne nepre ĉiuj kolonoj bezonatas. Sed manko de pluraj malhelpas al la celo.

Mi analizu la pasintan IJK-on laŭ mia grafikaĵo.

La LKK ekster propra kulpo estis sufiĉe malforta aldonindas, ke por la partoprenantoj tute ne klare videblis, kiu havas kian taskon., eĉ dum la tuta semajno ne klaris, kiuj estas la LKK-anoj. Simplaj manieroj por tion montri estas alikoloraj nomŝildoj por LKK-anoj kaj prezentofotoj en la programlibro.

Dum akceptado (kiu vere funkciis nur ekde la dua tago), oni estis demandita, kiam oni antaŭpagis (!), kaj oni rekalkulis ĉiujn kostojn laŭ la kotiztabelo surpapere Ŝajnas al mi, ke oni tute ne havis datenbazon kaj la aliĝdatenojn. Tiu maniero de akceptado certe ne estas rekomendinda. Homoj ĉeestis. Kiel kutime en junulara esperanto-renkontiĝo estis multaj diversspecaj homoj el diversaj landoj kaj kulturoj, kiuj alportis la bazon por la bona etoso.

La ejo laŭ mi estis netaŭga. Laŭ mia impresoj plej multaj preferus alian luksnivelon, tamen iel akceptis aŭ devis akcepti la ejon kia ĝi estis. Mia propra opinio estas: Se estas tiaj - por plej multaj nekutimaj - niveloj de komforto, oni almenaŭ sciu tion antaŭe apenaŭ

ekzistis seĝoj kaj tabloj por libere babili. Bedaŭrindas ke la ejo estis tiom for de la urbocentro.

Gufujo ne estis. Necesus mallaŭta, tamen ne malcentra ĉambro, tabloj, seĝoj, kandeloj.

Trinkejo ekzistis. Tie eblis aĉeti trinkaĵojn je ĉambrotemperaturo Sed trinkejo ne nur estas ejo por aĉeti trinkaĵojn. Ĝi kutime estas ankaŭ ejo por festi, diboĉi kaj danci sur tabloj. Ĉi ĉio tute ne eblis.

Pri la diskejo Mi pensas tamen, ke laŭ partoprenantaro kaj grandeco ĝi estis taŭga.

Tipa filmejo ne ekzistis. Chuck Smith montris kelkajn mojosajn filmojn en la lernejo dum unu posttagmezo. Tamen estis kelkaj solvendaj malfacilaĵoj rilate la teknikon.

La taga programo estis sufiĉe bona. Estis Esperanto-kursoj, prelegoj, diskuttrondoj ktp. Plibonigeblas la maniero oferti la programon al partoprenantoj, ekz. per antaŭe preparita programlibro.

La koncertoj vespere estis sufiĉe sukcesaj. Indus transpreni la tradiciajn IJK-elementojn kiel internacian vesperon kun muziko, poemoj, skeĉoj ktp. kaj surscenejajn ludojn kiel “Kiu volas iĝi milionulo” aŭ simile.

Ne estis unusola tuttaga ekskurso al iu apudurba loko, sed ja sep samtempe al diversaj celoj en la urbocentro de Kievo. De multaj homoj mi aŭdis, ke la ekskursoj estis bonaj.

Mi tamen observis mankojn kadre de la preparoj. Je la ekskursotago ĉiuj ekskursemuloj kaj grupoj renkontiĝis antaŭ la domo, tiel ke bezonatis longa tempo por ordigi la homamason. Mi aŭdis, ke oni planis uzi la flavajn busetojn por ekveturi. Mi miras, kiel tio funkciis, ĉar ili kutime jam estis plenaj ĉe alveno al nia bushaltejo. Por pli ol dek homoj verŝajne malfacilis eniri.

Pri kromaj aferoj mi ne volas diri multe Mi esperas, ke oni ankoraŭ ricevos adresaron.

Kiel dirite, ne ĉiuj tiuj kolonoj bezonatas por bona IJK. Ekzemple dum IJK en Hanojo la kolonoj “taŭga ejo” kaj “ekskursoj” kaj “programo” portis preskaŭ la tutan konstruaĵon - ĉar ili estis sufiĉe fortikaj, dum tute mankis ekz. trinkejo, gufujo, ludejo kaj filmejo.

Laŭ mia propra takso kaj post multaj babiladoj kun aliaj partoprenantoj, mi pensas ke mi rajtas diri, ke la konstruaĵo “IJK-67” sufiĉe forte ŝanceliĝas. Konkize: La IJK devas esti pli ol nur la homoj.

Mi esperas, ke mia analizo estas klara kaj komprenebla. Mi ĝojas legi viajn opiniojn pri ĝi. Krome mi esperas, ke ĝi povos helpi al sekvaj LKK-oj analizi la preparojn.

[Carolin Weemeyer](#)

Carolin, 29-jara instruisto el Germanujo, ankaŭ partoprenis ĉiujn IJK-ojn de 2005 ĝis 2009. Krome ŝi dum pluraj jaroj partoprenis en la organizado de Internacia Seminario, la popularega aranĝo de Germana Esperanto-Junularo.

*IJK okazas en Kievo,
la ĉefa urbo de Ukraini’.
Alvenas junuloj el tuta mondo
al “Barispal” kaj Ĵuljani.*

*Flavaj malgrandaj busetoj kievaj
transportas nin al la bazej’.
Ilin eniri kun grandaj pakaĵoj
vere ne simplas plej.*

*En la bazejo renkontas mi homon
afablan kun granda ridet’.
Li diras “Saluton! Do you speak English?”
kaj mi pensas “Fek! What’s that?!”*

*“La registrejo funkcios nur morgaŭ,
sed jen estas via ŝlosilo.
Bonvolu atendi kaj doni pasporton,
mi tradukas ĝin al la cirilo.”*

*Post longa vojaĝo bezonas reŝargon
moderna teknologi’,*

*sed vane serĉeblas en mia ĉambro
kurento (amiko de mi).*

*Mi jam fiodoras pro ŝvito tre forte
kaj tial tuj iras al duŝo,
sed eĉ post atendo la akvo malvarmas,
do evidentiĝas jen fuŝo.*

*Malvarma duŝakvo, malvarma trinkaĵo -
mi pensas, do ek al trinkejo.
Martin atendas kun granda elekto
sen fridujo en bela varmejo.*

*Post tio vizitas mi la necesejon,
sed fakte ĝi estas nur truo.
Mi pisas kaŭrante kaj poste konstata
foreston de akvoŝluo.*

*Tuj poste mi sentas min jam pli bone
kaj serĉas necesejan paperon.
La solvon de tio mi nun ne rakontas -
ĝi fekas, por diri la veron.*

*Pli bona pisejo troviĝas en Budmo -
jen brila restoraci’.
Sed ve! Mi konstata, ke oni forgesis
la mendon de manĝo por ni.*

*Krom esperantistoj ĉeestas ĉi tie
centmiloj da sangosuĉuloj.
Mian ĉeeston dum longtempo pruvos
la tutkorpaj kulo-makuloj.*

*Dumtage pro ŝvito mi nur lagumadas,
prifajfas programajn ofertojn.
Vespere mi helpas plenigi diskejon
por ĝui bonegajn koncertojn.*

*Fine de tiu poemo mi diras
nome de ĉiuj partoprenantoj:
Sanon kaj ĉion bonan al Mikaelo
kaj dankon al la organizuntoj.*

Robert Weemeyer

Intervjuoj pri amrilatoj kaj esperantisteco

Kial tiu stranga kombinaĵo de temoj? Ĉar esti serioza esperantisto estas kvazaŭ edziĝi al Esperanto kaj la demando povas leviĝi kiu venas unuavice: la partnero aŭ la lingvo ?

Marcos estas 27-jara germana esperantisto, naskita en Argentino, kien iam liaj geavoj elmigris el Germanujo. Li estas seriozega esperantisto kaj ambicia. En 2010 oni elektis lin esti la plej juna akademiano. Kiel tia li sekvas kaj komentas la evoluon de la internacia lingvo, kun 43 aliaj akademianoj.

Marcos havas edzinon, Uljana, kaj eĉ jam havas bebon dujaraĝan, Milena, dum liaj samaĝaj konatoj plejparte ankoraŭ ne pensas pri infanoj. Li renkontis ŝin dum 'Internacia Seminario 2004/2005'. La amo montriĝis stabila kaj post malpli ol tri jaroj jam ili geedziĝis. Ili komence demandis sin kion ili havas komunan, ĉar la rilato estis je distanco – li studis tiam en Britujo - kaj estis diferenca religiemo. Sed malkovriĝis ankaŭ komunaĵoj: politika verduleco, ŝatado de kuirado, interesiĝo pri lingvoj kaj emo al frua planado de ido. Uljana universitate studas du apartajn fakojn, orientslavajn studojn kaj instruadon de la germana lingvo al fremduloj.

La paro decidis kreskigi la bebon laŭ UPUL: paĉjo konsekvence parolas Esperanton, panjo la rusan kaj preskaŭ ĉiuj aliaj beb-rilatantaj personoj la germanan.

Jam junaĝa, Marcos havis la ideon ke li volas havi trilingvan familion! Do kia bonŝanco ke li renkontis ruslingvan knabinon (kiu cetere ankaŭ sciis la germanan, el germanlingva patrino; la geedzeco ne estas disnacilingva).

La multnacieco de la edzeco kongruis kun la maniero en kiu li travivis sian junaĝon. Lia patro, oficisto de Lufthansa (Germana aerflugokompanio), kaŭzis, ke la familio de Marcos ofte transloĝiĝis: al Ganao, Turkujo, Sudafriko, Egiptujo, Germanujo, Argentino, Brazilo, Germanujo. La lastajn tri landojn el tiuj li konas.



Bildo 3: Milena, Uljana kaj Marcos

Ĉu Marcos kaj Uljana, kiel multodevena esperantista familio, ne staras iom ekster la mezuma vivostilo de siaj samaĝuloj ? mi demandis lin. Jes, opinias Marcos. Tiu stato malmulte malhelpas integriĝon en nova loĝloko - li transloĝiĝis al Bonn (ĉefurbo de iama Okcident-Germanujo). Tie li ne intense partoprenas la mojosecan vivon de dudekkelkjaruloj kaj iom hezitas deklari al siaj proksimuloj, kiam pridemandite, ke li havas kvindekjaran esperantistinon kiel 'amikon'.

Efektive Marcos facile miksiĝas kaj senĝene debatas kun grizuloj, kiel ekzemple kun mi. Li ankaŭ estas konata kiel iniciatinto de Bonlingva Vortaro, kiu celas kombini la plej bonan el la retdiskutlisto la-bona-lingvo, la Reta Vortaro kaj la baldaŭ enretigota Plena Ilustrita Vortaro. Lia argumentado estas rapida, la parolado hasta, la piedirado decidema. Baldaŭ la familio Cramer renove transloĝiĝos.

Dieter Rooke, brilajn okulojn en afabla vizaĝo, proksimiĝis min decideme en la halo de la kongresejo Bella Center: "Mi volas esti intervjuata." ¹ Devas esti ke li havas ion por rakonti, estinte dum 63 jarojn jam sur la terglobo. Li estas germano de naskiĝo, sed loĝas nun en Oensingen, eta vilaĝo en Svislando. Lia esperantiginto, antaŭ 31 jaroj, estas Claude Gacond, veterano plej konata kiel stariginto kaj arĥivisto de CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia). Didi Weidmann, nuntempe kunprezidanto de SES (Svisa Esperanto-Societo) varbis lin surstrate.



Bildo 4: Dieter Rooke kaj Liu Jun

Kiel juna liberpensulo kaj ateisto Dieter eksperimentis en amrilatoj, kiel ĉiu junulo. Pro la malvarma milito interalie li ebligis al orientgermano el Berlino kun du filinoj komenci novan vivon en iama okcidenta kapitalista Germanujo. Poste li enamiĝis en 1987 al svisa Corinne, sed ŝi kreskigis malestimon al Esperanto pro la fakto ke ŝia edzo ofte iris al kongresoj. Tio profunde ofendis Dieter. La kunvivado produktis filon, sed jam post du jaroj la paro disiĝis. Laŭ la svisa leĝo tiam infano aŭtomate ekapartenas al la patrino. La patro havas la pruvodevon, ke la infano pli bone fartos, se ankaŭ li kreskigos ĝin. Tio sukcesis al Dieter post kvar dolorplenaj jaroj.

Tiam li aspiris pli daŭran kaj seriozan amrilaton kaj pensis trovi tiun antaŭ nelonge kun 42-jara ĉinino Liu Jun [Liŭ Ĝjun], instruistino de la ĉina, pli bone: 'mandarena' lingvo. Ŝi loĝas en Tian Jin [Tjan Ĝin]. Dieter kaj Liu renkontis unu la alian en Ŝanhajo. Post tio la duonsvisa kuraĝulo vizitis Ĉinuojn renove por renkonti ŝin. Tamen ili ne planis kunvivi en Ĉinujo, sed montriĝis koŝmaro por Liu akiri eŭropan vizon. La unua vizopeto malsukcesis, ĉar iam Italujo estas rifuzinta vizon al ŝi kaj tio kreis malfidemon pri ŝi ĉe la svisaj aŭtoritatoj kiuj kunlaboras kun la Ŝengena zono, kiam ŝi klopodis renove. Dua klopodo fiaskis, ĉar kara Liu skribis, ke 'eble ŝi edziniĝos' ! Do la fianĉo kvaran fojon envojaĝis Ĉinuojn kaj tiam estis ceremonie ligita, la 8an de marto 2011a, en edzecon al Liu. Nun atendas ŝin plua necerteco pri akiro de svisa vizo. Dieter, optimisma, ne dubas plu pri tio. Liu ja estas inteligenta virino kaj ŝi havas pliajn argumentojn: Filino ŝia studas en Gdansk, Pollando.

La nun 22-jara filo havas rimarkindan rilaton kun sia patro. Ciril denaske parolas Esperanton al sia patro kaj tiu kunvojaĝigis lin kun si al Togolanda Instituto Zamenhof por ekkoni la tutmondecon de la movado. Li akceptis tiun obstinan konduton de sia patro, ĉar tiu pagis ĉion por li, ankaŭ studokostojn. Ĉu tiam riproĉi al li, ke li diras al siaj geamikoj ke Dieter estas 'frenezeta' ? Tamen sentiĝas iu bedaŭro en la voĉo de Dieter: Ciril ne havas esperantajn amikojn, kiel li eniros la movadon ? Ĝis nun li nur buŝe komunikis en Esperanto, li trapasis ekzamenon de nivelo B1 en Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds), sed ne scias verki eĉ meznivelan artikoleon.

"Kion li konsilas – mi demandis – al esperantisto kiu havas ne-esperantistan partneron ?" Dieter ne scias. Ĉu vi, leganto, scias ? Skribu al mi, [redaktanto](#), kaj vi estos la sekvonta intervjuato.

¹ reage al mia (Johan Derks) alvoko en la retdiskutlisto denask@googlegroups.com

En Kopenhago dum 'Kleriga Lundo' estis speciala kunveno sub la titolo

Esperanto: ĉu Fundamenta, postFundamenta aŭ preterFundamenta?

Tie la Akademianoj Renato Corsetti, Gerrit Berveling kaj Otto Prytz prezentis siajn starpunktojn.

La publiko surloke plenskribis demandaron distribuitan por mezuri la gradon de subteno al la Fundamento. La statistiko de la respondoj estas jena:

	jes	pli malpli	ne	ne respondis
Ĉu vi scias, kio estas la Fundamento ?	27	3	0	0
Ĉu vi iam vidis per viaj propraj okuloj ekzempleron de la libro "Fundamento de Esperanto"?	23	6	0	1
Ĉu vi legis La Fundamenton?	8	14 (= parte)	8	0
Ĉu en via kurso, kiam vi lernis Esperanton, oni instruis pri la Fundamento?	11	0	15	4
Ĉu en la kursoj, kiujn vi gvidas, oni instruas pri/per la Fundamento?	9	0	13	8
Ĉu vi iam legis la 16 regulojn de la Fundamenta Gramatiko?	28	0	2	0
Se iam vi dubas pri gramatikaĵo aŭ pri vorto, ĉu vi kontrolas tion en la Fundamento?	6	1 (= eble)	21	2
Ĉu vi pensas, ke la unueco de la lingvo estas grava?	28	0	2	0
Ĉu vi pensas, ke nun ekzistas tiom da esperantistoj, ke la Fundamento ne plu estas necesa, ĉar la komunumo mem donas la regulojn?	4	0	23	3

Ankaŭ la ĉeestantoj havis la okazon pasigi teston pri sia kono de la Fundamento.

Se vi interesiĝas testi pri via kono, klaku [ĉi-tie](#).

Anonco:

Mi kun morala kvalito, bela, 1,62m alta kaj 50 kg peza, naskiĝis en 1956, sed aspektas pli juna ol mia aĝo, ŝajnas ne pli ol 40-jara, kaj ŝatas literaturon kaj arton. Mi, kontistino, diplomigis en kolegio, estas esperantistino en Ŝanhajo kaj esperus formi internacian familion



kun esperantisto ĉirkaŭ aŭ malpli ol 65-jaraĝa el Kanado, Usono, Francujo, Hispanujo, Svislando, Anglujo aŭ alia lando. Responдон skribu al mia kuzo Ji Yingeng (jiyingeng@yahoo.com.cn), kiun mi petis transdoni la respondon al mi.

Ding Yumei

Igorj Ĥomjakov (Rusujo) rakontas:

En 1948 en Honkongo unu angla ŝipano ekvidis junan malgrasiĝintan virkaton kaj kaŝe alportis lin en la militan ŝipon "Amethyst". La virkato *Sajmon* kun entuziasmo komencis ekstermi ratojn, kiuj svarmis en malsupraj ferdekoj. Pro siaj scipovoj li baldaŭ meritis konfidon de la ŝipano. Li ankaŭ famiĝis pro siaj kondukstrangaĵoj: li metis mortigitajn ratojn en litojn de maristoj, dormis en kapitana kasketo.

En fino de 1948 la ŝipon "Amethyst" oni alpafis en Ĉinujo. Oni mortigis la kapitanon kaj multajn anojn de la ŝipano. *Sajmon* ankaŭ ricevis vundon. En ŝipa malsanulejo kuracistoj helpis al li: prilaboris multajn brulvundojn, eligis el lia korpo kvar ŝrapnelajn kuglojn. Estas nekredeble, sed *Sajmon* restis viva kaj ree komencis plenumi siajn devojn. Kiam li venis en la ŝipan malsanulejon, eĉ tre junaj ŝipanoj komprenis, ke vundo ne estas motivo perdi kuraĝon.

Famo venis al *Sajmon* post alveno de la ŝipo en Britujon. Pri li oni skribis en gazetoj ne nur en Britujo sed en tuta mondo. Oni rekompencis lin per tri medaloj, li ricevis titolon "La kato estas avanulo demararmeo". Al *Sajmon* oni sendis tiom multajn leterojn, ke oficiron de "Amethyst", kiu estis devigata respondi je tiuj leteroj, oni liberigis de ĉiuj aliaj devoj.

Bedaŭrinde baldaŭ la virkato infektiĝis, kaj malgraŭ ĉiuj penoj de kuracistoj malfortigita pro vundo *Sajmon* mortis en 1949. Dum lia enterigo ĉeestis centoj da homoj, ankaŭ la tuta ŝipano de "Amethyst".

Tradicia Renkontiĝo de Esperantaj Familioj en Lesjöfors

REF ĉi-somere atingis sian plej nordan ejon; ĝi estis gastigita en hostelo "Esperanto ĝardeno" en la sveda vilaĝo Lesjöfors inter 22-a kaj 31-a de julio 2011a.



Bildo 5: El dek unu landoj en Lesjöfors, Svedujo

La aranĝon partoprenis ĉi-jare 13 familioj el 11 lando el Eŭropo kun unu gastino kiu venis eĉ el Kanado - entute partoprenantaro nombris 51 personojn, el tio 26 infanoj inter 1 kaj 16 jaroj. Kvankam la nombro de partoprenantoj malkreskis kompare kun kelkaj antaŭaj REF-oj, tio tamen estis sukceso pro la longa kaj multekosta vojaĝo por plej multe da E-familioj. Tamen la organizantoj, familio Ludberg/Petrović kaj Martin Strid nome de Ido-fondaĵo kaj la ejo, sukcesis oferti tute favorajn kondiĉojn al ĉiuj kiuj emis kaj povis partopreni tiun tradician aranĝon kiu por plejmulto da partoprenantaj familioj estas deviga parto de ĉiuj someraj planoj.

Krom agrabla ejo kaj por svedaj cirkumstancoj tre favora prezo la REF-aron atendis ankaŭ neatendite bela kaj varma vetero kiu ebligis multe da eksterdoma aktivado - ekde naĝado en pluraj najbaraj lagoj (kie akvotemperaturo superis 20 gradojn) tra arbarpromenadoj kaj kolektadoj de arbarberoj ĝis sportaj ludoj. Ankaŭ ekskursita tago ofertis neforgeseblajn spertojn: unue veturadon per malnovaj "usonstilaj" ĉevalĉaroj, poste kanuadon tra riveroj kaj lagoj kaj fine la lacigan, sed ankaŭ amuzegan relbicikladon laŭ forlasitaj reloj de iama fama

"Inlandbana", enlanda fervoja linio kiu ĝis 80-aj jaroj konektis urbetojn kaj vilaĝojn de kontinentaj arbaraj regionoj de meza Svedio.

Kompreneble, ne la tuta aktivado okazis ekstere: gepatroj preparis plurajn laborgrupojn kaj programerojn, kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj. Infanoj tre ŝatis maskofaradon, pentradon, filmofaradon, origami-arton kaj ŝnurfigurkre-arton (fojfoje nomata [ajatori](#), laŭ la japana nomo, JD), preparadon de kasteloj el kartono Sed, kiel ĉiam kun infanoj, ankaŭ eksterprogramaj aktivadoj estis tre amuzaj, kiel ludo en flako apud la ejo aŭ uzo de malnovmoda herbejfalĉilo.

Do, laŭ ĉiuj aspektoj la ĉi-jara REF estis tre sukcesa kaj ĉiuj familioj bedaŭris kiam venis la adiaŭa tempo. Komuna gaja kaj vigla etoso kiu regas dum REFoj ne estas facile forgesebla, infanoj ĝuas la amasajn ludojn en granda ena kaj ekstera spaco kaj gepatroj havas la eblecon denove renkonti malnovajn amikojn aŭ ekkoni novajn Kaj, ankaŭ grave, ripozi pli ol dum la kutima familia vivo !

Fine, mi deziras danki al organizantoj kaj ĉiuj kiuj kontribuis al ĉi-jara tre bona REF.


[Vanja Radovanovic](#)

Laŭ internacieco (dek unu landoj) Lesjöfors okupas la trian lokon en 33 jaroj

Estas interese sekvi la evoluon de la lokoj, kie en la pasintaj 33 jaroj REF okazis, plejmulte en orienta Eŭropo. Tio estas komprenebla el la fakto, ke Germanujo jam konas – kaj daŭre pli – jarfinajn aranĝojn kaj kunvenojn, ekz. de 'Esperantolando', tra la jaro. Nun tamen REF aŭdacas moviĝi el sia regiona hejmo, en 2012 okcidenten al Sayda kaj eble en 2013 orienten tute al Krimeo !

Kion alportos Sayda, kie organiziĝos la 2012a-jara REF? Ĉu partoprena rekordo ?

La diametro de la cirkloj proporcias la nombron da partoprenantoj – Ĉeĥujo ĉampionas - kaj la nombro skribita en ili indikas la mezuma nombro da landoj, el kiuj venis la partoprenantoj – Serbujo kaj Francujo ĉampionas.



venontaj aranĝoj

	2011(-2012)	2012(-2013)
Internacia Esperanto Semajno	29-6/5-7, Jerevan/Ĉaĥkadzor, Armenujo	27-6/3-7, Jerevan/Ĉaĥkadzor , Armenujo
Renkontiĝo de Esperantaj Familioj	22-7/31-7, Lesjöfors, Svedujo	?, Sayda , Germanujo
Internacia Lingva Festivalo	15-10/23-10, Ĉeboksaro , Rusujo	
Kijiv a Esperanto-Semajno	23-10/29-10, Kijiv , Ukrainujo	
Junulara E-Semajno	27-12/1-1, Gdansk , Pollando	
Internacia Festivalo (HDP)	27-12/3-1, Xanten , Germanujo	
Novjara Renkontiĝo, (Esp-Land)	27-12/3-1, Bitburg , Germanujo	
Novjara Internacia Semajno (Esp-Land)	27-12/3-1, Bitburg , Germanujo	
SANO (ICH)	28-12/2-1, Sieber , Germanujo	
Jarfina Renkontiĝo Grésillon	?-12/?-1, Grésillon , Francujo	

unua Internacia Esperanto semajno (IES-1)

[Susanna Baghdasaryan](#), prezidanto de Armena Esperantista Unuiĝo, sendis raporton pri tiu kunveno, kiu okazis de 29-06 ĝis 5-7-2011 en la Armenaj ĉefurbo Erevan kaj ripozurbo Ĉaĥkadzor. Ĝin partoprenis 41 personoj el 5 landoj kaj ĉeestis pli ol dudek ne-esperantistoj.

IES-1 pasis sub la devizo "Paco en la tuta Mondo (interkompreno, toleremo)". Ĝi ĝuis interesiĝon ĉe famkomataj esperantistoj. kiel Claude Nourmont kaj ŝia edzo Brian Moon, vicprezidantoj de respektive UEA kaj

Akademio de Esperanto. La hodiaŭa kaj antaŭa prezidantoj de UEA sendis salutmesaĝojn, kiel ankaŭ Barbara Pietrzak kaj Amri Wandel, estraranoj de UEA. Pri la programo mi menciis prelegojn laŭ la temoj:

“Esperanto kiel lingvo por paco” (Lida Elbakjan) kaj “La lingvo kiu amikigas” (Hripsime Mkrtĉjan). Inter la prelegoj estis muzikaĵoj ludataj de stipendiatoj de la fonduso 'Vladimir Spivakov', laŭreatoj de Internaciaj festivaloj. Eksterordinara estis interkona vespero ĉe la tablo de vespermanĝo, organizita de armenaj esperantistoj. Poste armenaj esperantistoj prezentis teatraĵeton “La morto de Kikos” laŭ la samnoma verko de la fama armena verkisto Hovhannes Thumanjan.

Dum IES-1 estis organizita fotokonkurso “La amikeco savos la Mondon”, kiun partoprenis esperantistoj el Kubo, Italio, Ukrainio, Irano, Israelo, Danio, Aŭstralio kaj Armenio. Laŭ la rezultoj de voĉdono la unuan premion gajnis foto “Amikeco”, sendita de Annarosa Andrei el Italio. La duan premion - pro belegaj fotoj kun esperantaj simboloj kaj pro la plej aktiva partopreno de fotokonkurso (laŭ decido de juĝantaro) - ricevis Granma Esperanto-Filio el Kubo.

En Caĥkadzor estis komunpreparita la tagmanĝo ŝaŝliĥo. Okazis ankaŭ internacia vespero, kiun partoprenis ĉiuj (kantoj, dancoj, anekdotoj, ludoj), italaj kaj armenaj esperantistoj prezentis komunan teatraĵeton. Armenaj esperantistoj invitis gastojn por adiaŭa vespero. Ni ĉiuj ege bedaŭris, ke tiel rapide pasis la tempon kaj esperus pri sekvonta renkontiĝo.

Okazis duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj dum kiuj niaj gastoj vizitis [Matenadaran](#) - deponejo kaj sciencsplora

instituto de antikvaj manuskriptoj, monumenton kaj muzeon, dediĉitajn al memoro de la armena genocido de 1915a jaro, Yerevan Brandy Company kun gustumo de armenaj famaj konjakoĵoj, la paganan templon de [Garni](#), lagon Sevan, la fortikaĵon kaj muzeon de Erebuni. Ili vizitis ankaŭ la katedralojn de [Ēĉmiadzin](#) kaj de [Zvartnoc](#), monaĥejon Geghart kaj monaĥejon [Noravank](#).

Por la italaj kaj svisaj esperantistoj estis organizita speciala antaŭ IES-1 unusemajna ekskurso al la suda parto de Armenio kaj respubliko Arcaĥ (Nagorno-Karabaĥ). Dum ekskursoj la gastoj vizitis la monaĥejojn [Ĥorvirap](#) kaj Noravank, "Zorac Karer", ankaŭ konata kiel [Karahungŭ](#) kaj komparebla kun Stonehenge, kiu havas historion de 7500 jaroj, la monaĥejojn de [Tatev](#), Gndevank, la mineralajn akvojn de Ĝermuk. En Arcaĥ, en la urbo Ŝuŝi oni vizitis la belegan preĝejon Ghazanĉecoc, persan kaj turkan moskeojn kaj la fortikaĵon de Ŝuŝi. Poste ili vizitis la ĉefurbon Stepanakert kaj la monaĥejojn Gandzasar kaj Amaras, kie komence de la kvina jarcento la kreanto de la armena alfabeto Mesrop Maŝtoc fondis la unuan lernejon en Arcaĥ.


Armena Esperantista Unuiĝo ege dankas al s-ino Sonia Amariglio el Francio por la donaco al IES de 1150 eŭroj. IES-2 okazos je la 27-a de junio ĝis la 3-a de julio 2012a en Erevan kaj arbara ripozurbo Caĥkadzor. Por informoj vizitu <http://www.area.am/?Lng=1&ID=12>.



Bildo 6: templo de Garni



Bildo 7: muzeo Matenadaran



Bildo 8: katedralo de Eçmiadzin



Bildo 9: katedralo de Zvartnoc



Bildo 10: monaĥejo Noravank



Bildo 11: monahejo Hórvirap



Bildo 12: Monahejo de Tatev



Bildo 13: Karahunj